

Johann Wolfgang von Goethe,
Liga kanto
tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Dum ĉiuj bonaj horoj
 Kun amo, bona vin',
 Eksonu el la koroj
 La kanto en kazin'
 Kuntenas nin ja Dio,
 Nin kunvenigis li,
 Pro tio harmonio
 Ne mortos tie ĉi!

2. Do ĝoju kun kontento
 Unuanimaj ni!
 Denove en momento
 De kora simpati'!
 Tintigu tuj la glason
 Kun tia bona vin',
 Ne zorgu, nian kason
 Prizorgos la destin'.

3. Ĉu iri en la rondo
 Ne restas kun plezur'?
 Konservas ni en mondo
 L'emblemon de natur'!
 Por ĉiam niaj koroj
 interkonsentu, kaj
 Pro malserenaj horoj
 Ne ĉesu nia gaj'!

4. Nin Dio benis, vere,
 Liberaj sentas ni,
 Pro iu sperto tere
 Nur kreskas energi'.
 Malhelpos ne kaprico
 Nek ŝajno de afekt',
 Nin ĉiujn, laŭ la vico,
 Imponos nur korekt'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Bundeslied

1. In allen guten Stunden,
 Erhöht von Lieb und Wein,
 Soll dieses Lied verbunden
 Von uns gesungen sein!
 Uns hält der Gott zusammen,
 Der uns hierher gebracht.
 Erneuert unsre Flammen,
 Er hat sie angefacht.

2. So glühet fröhlich heute,
 Seid recht von Herzen eins!
 Auf, trinkt erneuter Freude
 Dies Glas des echten Weins!
 Auf, in der holden Stunde
 Stoßt an und küsstet treu,
 Bei jedem neuen Bunde,
 Die alten wieder neu!

3. Wer lebt in unserm Kreise,
 Und lebt nicht selig drin?
 Genießt die freie Weise
 Und treuen Brudersinn!
 So bleibt durch alle Zeiten
 Herz Herzen zugekehrt;
 Von keinen Kleinigkeiten
 Wird unser Bund gestört.

4. Uns hat ein Gott gesegnet
 Mit freiem Lebensblick,
 Und alles, was begegnet,
 Erneuert unser Glück.
 Durch Grillen nicht gedränget,
 Verknickt sich keine Lust;
 Durch Zieren nicht geengt,
 Schlägt freier unsre Brust.

...

5. Post ĉiu pašo nova
 Klarigas viva sort':
 L'unua estas prova,
 La lasta estas mort'.
 Sed ne do timo iel
 Malserenigos nin,
 Fidelaj ĉiam kiel
 Nin kreis la destin'!

5. Mit jedem Schritt wird weiter
 Die rasche Lebensbahn,
 Und heiter, immer heiter
 Steigt unser Blick hinan.
 Uns wird es nimmer bange,
 Wenn alles steigt und fällt,
 Und bleiben lange, lange!
 Auf ewig so gesellt.

*Traduko de la Germana poemo “Bundeslied” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-86-171 (2003-11-10 08:21:52)

Arg-86-172 (2004-09-06 05:32:34)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Esperantista Kantaro”, kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).